

Staru Flanke de La Sinjoro

Kiam Ni Konfuziĝas pri Diversaj Konfliktoj de la Vivo, Ni Devas Halti kaj Kompari la Bonon Kontraŭ la Malbonon

Prezidanto George Albert Smith, antaŭa Prezidanto de la Eklezio, diris, ke estas du influoj en la mondo. "Unu estas pozitiva kaj venas el nia Ĉiela Patro, la alia malnobligas kaj detruas nin kaj venas el Satano. Kiam ni vivas laŭ la ordonoj de Jesuo Kristo, Satano ne povas influi nin, sed se ni transiras la limon kaj iras al la teritorio de Satano, li povas influi kaj subjekti nin al sia povo."

Ni povas elekti ĉu aŭskulti la voĉon de Jesuo Kristo ĉu la voĉon de Satano. Se ni sincere deziras sekvi la piedspurojn de la Sinjoro kaj se ni lernus sinregadon, ni scius, ke Satano ne kapablas devigi nin fari malbonon. Satano nur povas proponi. Li ne povas devigi iun ajn.

Ni povas fortigi nian decidon resti flanke de la Sinjoro. Niaj ĉiutagaj faroj inkluzivas la konscian penson, "Ĉu miaj faroj estas laŭ la principoj de Jesuo Kristo aŭ ĉu mi iras trans la limo al la sfero de Satano?" Harmonie faru agojn laŭ principoj, kiuj estas veraj.

Listo de la metodoj de la Sinjoro unuflanke kaj la metodoj de Satano aliflanke provizas klaran komparon.

La Plano de Jesuo Kristo Evangelio de Jesuo Kristo

1. La evangelio estas grandioza. Ĝi enhavas ĉion, kio estas bona kaj vera.
2. Ĉiu principo kaj leĝo de la evangelio levas kaj liberigas nin.
3. Ĉiu ago, kiun ni harmonie faras laŭ la principoj de la evangelio plibonigas la vivon.
4. La evangelio klarigas por ni nian eternan ekziston kiel filoj kaj filinoj de Dio.
5. La evangelio klarigas al ni, ke ni estas liberaj agantoj, kiuj agas laŭ nia propra volo.
6. La evangelio klarigas, kial bono kaj malbono devas ekzisti en la mondo.
7. Ni ricevas pardonon kiam ni rekonas niajn pekojn kaj elektas pentofari.
8. La evangelio instruas, ke scio kaj inteligenteco gajnitaj dum la mortema vivo leviĝos kun nu kiam ni releviĝos.
9. Kiam ni sekvas la principojn de la evangelio ni ricevas pacon kaj ĝojon per la donaco de la Sankta Spirito.
10. Ni kreas amantajn interrilatojn kaj trovas feliĉon kiam ni lernas ami kaj servi aliajn.
11. La Sinjoro promesas al siaj infanoj ĉion, kion li posedas.
12. La Sinjoro konsilas, "Memoru fidon, virton, scion, sobrecon, paciencon, fratecon, piecon, amon, humilecon kaj diligentecon." Ĉi tiuj virtoj kvalifikas nin vivi kun Dio kaj Jesuo Kristo.

La Plano de Satano

Satano kaj la mondo

1. La plano de Satano miksas duonveraĵojn kun mensogoj kaj trompo por kapti kaj detrui homojn.
2. Praktikoj rekomenditaj de Satano malnobligas kaj katenas nin.
3. Ĉio ago egoisme farita malpliigas la eblecon atingi veran ĝojon.
4. La trompoj de Satano intermiksitaĵoj kun la filozofioj de homoj proklamas, ke la vivo ne daŭras post la mortema ekzisto.
5. La filozofio de Satano instruas, ke la agoj de homoj estas nur reagoj al heredaj kaj mediaj influoj kaj ke ni ne kulpas pri niaj agoj.
6. Satano diras, ke la mondo kaj vivo ekestis hazarde kaj ke ili estas vanaj.
7. Satano diras, ke estas nenia peko.
8. Satano diras, ke la morto finas la ekziston kaj ke scio nur valoras por monda gajno.
9. Kiam ni cedas al la mondaj praktikoj, ni nuligas la influon de la Sankta Spirito.
10. Ni detruas amantajn interrilatojn kaj kreas por ni mem personan malĝojon kaj solecon kiam ni sekvas la sugestojn de Satano.
11. La plano de Satano instigas momentan karnan plezuron, kiu celas al eterna mizero por ĉiuj.
12. Satano konsilas, "Serĉu malbonon, cedu al vantemo, fiereco, avido, malhonesteco, voluptemo, adulto, pornografio, kaj la uzo de drogoj kaj alkoholo." Kiam ni tiel cedas, ni neniam povos vivi kun Dio kaj Jesuo Kristo.